



TEA-BULTENO

3^a JARO





AŬGUSTO 2000

NUMERO 8



AGENDO



- 1 M Ordigo de TEA-arkivo
- 2 M
- 3 Ĵ
- 4 V Kartludado 
- 5 S
- 6 D
- 7 L
- 8 M Ordigo de TEA-arkivo 
- 9 M
- 10 Ĵ
- 11 V Ni kunĝuu iom da muziko 
- 12 S
- 13 D
- 14 L
- 15 M **Bonan mezaŭgustan festotagon!**
- 16 M
- 17 Ĵ
- 18 V Sen-tema babilado
- 19 S
- 20 D
- 21 L 
- 22 M Ordigo de TEA-arkivo
- 23 M
- 24 Ĵ
- 25 V Kartludado
- 26 S
- 27 D
- 28 L
- 29 M
- 30 M
- 31 Ĵ

**69^a Itala Kongreso de
ESPERANTO**

**Casalecchio di Reno
(Bologna)**

VORTOJ DE LA REDAKCIO

Alvenis aŭgusto, la plej varma monato de la jaro, kiu, pli ol ĉiu alia somera monato, precipe signifas libertempadon, finfinan ĝuadon de meritata ripozo, momenton por lasi la ĉiutagajn problemojn hejme kaj flugi for, aliloken, ĉu al senhoma insulo, ĉu al sablaj strandoj kune kun miloj kaj miloj da aliaj ŝvitantaj feriantoj, ĉu al plej altaj montaraĵoj por ĝui solecon kaj freŝecon, ĉu ... al unu el la pluregaj Esperanto-kunvenoj, kongresoj, seminarioj, konferencoj ...

En aŭgusto eblas elekti inter nombraj esperantistaj renkontiĝoj: antaŭ la fina decido, pripensu ke la Bolonja Grupo atendas vin ĉiujn en *Casalecchio di Reno* por la 69^a Itala Kongreso de Esperanto, ekde la 26^a ĝis la 30^a de aŭgusto, dum kiu oni pritraktos la jenan interesan temon:

Esperanto en la 3^a Jarmilo: kiaj perspektivoj?
Tamen, se ĉi-jare vi jam faris vian feri-planon kaj decidis partopreni en alilandaj aranĝoj, jam nun notu, ke absolute ne maltrafendas la

70^a Itala Esperanto-Kongreso
la 1^a Itala Kongreso de la 3^a Jarmilo
okazonta en Triesto
28 julio - 1 aŭgusto 2001



TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO jam aktiviĝis por organizi neforgeseblan Kongreson, kun riĉa kaj interesa programo, kun ebloj plej variaj por konatiĝi kun la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵoj. Oni ĝuos ĉeston de elstaraj prelegantoj, spektos teatraĵojn, ekskursos piede, boate, aŭtobuse, spertos la gastamon de triestanoj ktp ktp.

Do, antaŭ ni staras jaro de intensa laborado: tial jam nun estas varme invitata la loka kaj tutlanda esperantistaro, vige, verve kaj entuziasme kunlabori en la preparoj de la nacia kongreso. Ĉiu ajn helpa formo povas kontribui al la sukceso de ĉi tiu grava evento. Kun fido ni atendas nombregajn sinproponojn.

NB: En preparo ttt-paĝaro, pere de kiu eblos eĉ aliĝi rete.

≧EO savita!

Ĉu vi memoras, ke en la julia numero de nia bulteno, aperis alvoko de s-ro Ro Bosson, okaze de rea inaŭguro de Esperanto-monumento sur Insulo Texel, per kiu li petis subtenon fare de la tutmonda esperantistaro, por ke ĝi reagu al malfavora artikolo de loka gazeto kaj konsekvenca same malfavora sinteno de la urba estraro? Nu, bone, lia alvoko ricevis bonan, eĉ bonegan rezulton tiel ke... Sed vi mem legu kion li skribas:

Estimata redakcio **RET-INFO** kaj **EVENTOJ**.

En la suba artikoleto mi skribis, laŭ via peto, pri la okazintaĵoj rilate al la Esperanto-monumento sur la Nederlanda Vadomara insuleto *Texel*: via disinformado okazigis veran lavangon de centoj da leteroj al la loka gazeto **DE TEXELSE COURANT** kaj al la tiea magistrato, pri kio oni tie miregis.

Rea inaŭguro de Esperanto-Monumento

Sabaton la 17^{am} de junio estis reinaŭgurita, post funda riparo, la konata Esperanto-monumento sur *Texel*, insuleto tre ŝatata de turistoj. «Dank' al fideleco de Teksel» staris sur la rubando de la florkrono, metita sur la monumento. Samtempe la festa reinaŭguro estis dankesprimi al tiuj tekselanoj, kiuj dum la nazia okupado, kun risko de propra vivo, savis kaj kaŝis gravajn ornamajn partojn de la monumento. Tuj post la milito *Siem de Waal*, la konstruinto-masonisto kaj fervora esperantisto, venis sur la insulon kiel brita soldato kaj kun kelkaj aliaj rekonstruis ĝin. Ekde tiam, pro la paso de la jaroj, ĝi estis sufiĉe eluzita kaj bezonis drastan riparon kaj purigon.

La inaŭgura ceremonio estis farita de *Hans ten Hage* kaj *Ronald Bijtenhoorn*, estraranoj de la landa asocio **ESPERANTO NEDERLANDO**. La historiisto *Hari de Graaf* rakontis pri siaj junaĝaj rememoroj rilate al Esperanto kaj al la Monumento. Laŭ lia opinio, Esperanto meritas en niaj landoj reviviĝon: ne nur la lingvo mem, sed precipe ĝia vivkoncepto, la volo kompreni aliajn kulturojn kaj popolojn kaj tiel kunlabori al pli bona, pli paca mondo.

Kaj jen pri la antaŭokazaĵo, kiu riskis kaŭzi planan fiaskon al ĉi tiu manifestacio: la 3^{am} de majo la loka gazeto **DE TEXELSE COURANT** publikigis kritikan artikolon koncerne Esperanton, asertante ke ĝi estas eksmoda kaj apenaŭ vivetas, kaj ke la angla jam delonge transprenis la rolon de internacia lingvo. Pere de **RET-INFO** kaj **EVENTOJ** tiuj vortoj kaj la historio de la monumento atingis la reton: tio startigis reage veran lavangon da leteroj - rete kaj poŝte - el ĉiuj mondpartoj.

Jam la sekvan tagon la gazeto skribis, ke ĝi estas superŝutata per multegaj leteroj, kies skribintoj ofte tre efike refutis la asertojn de la gazeto. Tre impresis ankaŭ la leteroj el anglalingvaj landoj, en kiuj oni substrekis, ke la angla ne estas tiel facila, ĉie komprenata kaj ĉie uzata, kiel la gazeto tiel facilanime skribis.

Ne, Esperanto vivas kaj vivos, kaj kreskos plu, ĉar ĝi travivis jam multajn krizojn.

Ru Bossong - retadreso: ru.bossong.esperanto@hetnet.nl

Somera proverbo: **Mono monon naskas**

El la Proverbaro de L.L. Zamenhof

Plejparto de la informoj fontas el **Ret-Info**.

Tagiĝo en la Korea Duoninsulo

LEE CHONG-YEONG

Prezidanto de Korea Esperanto-Asocio

Post la dua mondmilito, pro la milita kaj politika konsidero, Usono kaj Soveta Unio dividis Korean Duoninsulon al du landoj: komunisma Norda kaj kapitalisma Suda Koreioj, kaj ĝi restas tiel dum la pasintaj 55 jaroj. Nun, ili estas la nuraj dividitaj landoj en la mondo. En tiu malgranda duoninsulo amasiĝas pli granda nombro da armiloj ol en la tuta Afrika kontinento. Ĝi estas la plej danĝera municiejo en la mondo.

Ŝajnas, ke la tagiĝo por reunuiĝo de la du Koreioj kaj paco venos. La 15^{am} de junio, la prezidantoj de ambaŭ landoj konsentis pri 5 punktoj:

1. Klopodo por unuiĝo sen aliaj intervenoj.
2. Rekono de la komunaj elementoj en la unuiĝaj proponoj de ambaŭ landoj.
3. Arangado de vizitoj inter la dividitaj familianoj ekde la 15^a de aŭgusto.
4. Interŝanĝo kunlabore en la terenoj de ekonomio, kulturo, sporto, sano kaj naturmedio.
5. Plej baldaŭ, komenciĝo de oficialaj komunikadoj inter la du landoj por realigi la interkonsentojn.

Ĉiuj Koreoj, sudaj kaj nordaj, bonvenigas ĉion ĉi kaj ambaŭ landoj nun sin preparas por detale plani ĝian plenumon. Kompreneble, reala unuiĝo, se ĝi sukcesos, venos post multaj jaroj.

La interkonsento estas signifa ankaŭ por nia Esperanto-movado. Antaŭ longa tempo estis multaj Esperantistoj en Norda Koreio. La tiama prezidanto de (Suda) Korea Esperanto-Asocio, Choi Duk-Shin, antaŭ 25 jaroj, pro politika konflikto kun la registaro, iris al Norda Koreio, kaj rendezuis Kim Il-Sung, tiaman Nordkorean prezidenton. Depost tiam ni nenion aŭdis pri li. Ankaŭ ĈINA ESPERANTO-LIGO aŭdas nenion el Norda Koreio, kvankam ĝi regule sendas la organon **EL POPOLA ĈINIO**. Mi supozas, ke nia movado en Norda Koreio estas dormanta. Tio donas al sudkoreaj esperantistoj novan taskon vekti la movadon en Nordkoreio. Se regula intervizito okazos, ni iros tien por alporti tagiĝon en la dormanta nordkorea Esperantujo. Mi esperas ke la Tutkorea Esperanto-Kongreso okazos ene de 10 jaroj.

Se vi konas iun nordkorean Esperantiston, bonvole informi min, sendante sciigojn al la jena retadreso: Lee@esperanto.net aŭ al Korea E-Asocio en Seulo.

Solvo de la enigmo aperinta en la junia **TEA-BULTENO**. La frazo rezultanta estas la jena:



Ĉiu granda historia okazaĵo komenciĝis kiel utopio kaj finiĝis kiel realaĵo.

El la konkursintoj (malmultaj!) kiuj korekte respondis, estis lotumita la gajninto, s-ino **LILIANA SIEGA**, kiu ricevis premie Esperantan libron. Gratulojn al la solvinto!



BULTENO de la membroj de

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@tiscalinet.it

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349